

Francilia federacio

KomitatKunsido (KK) 02/12/2022

Partopreno

- Pierre Gauthier, vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) rete ĉeestas
- Aleks Kadar, vic-sekretario (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) rete ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) rete ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Marianne Pierquin, vic-prezidanto (MP) rete ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ree malĉeestas

Ekde la antaŭa KK

La protokolo de la KK de la 06/09/22 estis aprobita kaj enretigita ĉe

<https://esperanto.paris/IMG/pdf/2022-09-06.pdf>

En septembro okazis eventoj por varbi: Homara Festo 09-11/09, Malfermitaj pordoj 17/09. Ekde oktobro denove okazas la kutimaj eventoj.

En novembro okazis KER ekzamensesio 26-27/11. Ĉio glatis krom malfunkciado de la laŭtparolilo de la televido, sed feliĉe ni povis uzi laŭtparolilon de la komputilo de Said. 2 C2S 1 C2K 1 C1P en la sidejo kaj 1 C2P hejme.

Kursoj

La kursoj malokazos dum la lernejoj jarfinaj ferioj.

- komencantoj, gvide de PG, ĵaŭde 19h-20h30, surloke, 3 lernantoj
- progresantoj, gvide de MP, lunde 18h30-20h, surloke, 5 lernantoj
- progresantoj, gvide de MG, vendrede 18h-19h30, rete per Skype, 4 - 10 lernantoj
- spertuloj, gvide de FLJ, marde 18h30-20h, surloke, 2 - 5 lernantoj

Ĉu ĉiu instruisto registris sian kurson en la retejon Edukado.net (la loko estu "Parizo", ne "Paris")? Jes, krom FLJ

Ĉu ĉiu instruisto kontrolis ke ĉiuj siaj lernantoj pagis kaj la kurson kaj la kotizon (tio urĝas por la kasisto)? Instruistoj povas demandi al LPI aŭ DL aŭ Said ĉu iu aliĝis aŭ ne al Espéranto-France. La instruistoj kontrolos.

Rimarko: Eric ne volas aliĝi al Espéranto France, li pagis por la kurso 80€ anstataŭ 50€ (kun kotizo li entute pagus 109€). Ni decidus lasi la aferon.

Memorigo pri la prezoj de la kursoj

Totalaj prezoj de la kursoj, por la tuta jaro 2022-2023, inkludante la kotizon al la asocio:

- surloka kurso: normala prezo 109€, malalta prezo por senimpostuloj 45€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35 -jaraĝaj 30€

- reta kurso: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 5€

Kotizo de Espéranto-France: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 5€

Prezoj de la surloka kurso sen la kotizo: normala prezo 50€, malalta prezo por senimpostuloj 25€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 25€

Memorigo pri kiel aliĝi

Novaj homoj povas aliĝi:

- per la reta formularo, kiu estas sur nia retejo <https://framaforms.org/formulaire-de-pre-inscription-cours-desperanto-2022-2023-1661770580> kaj LPI resendos al la instruisto
- per mesaĝo al info@esperanto.paris kaj LPI resendos al la instruisto

Kompreneble la malnovaj studentoj mem aliĝu rekte ĉe la instruisto!

Memorigo pri kiel pagi

- surloka kurso: la studento devas pagi al la instruisto la kurson mem, kaj la instruisto devas doni al DL la pagon de la kurso, por la kaso de nia francilia asocio, nepre antaŭ decembro por ke li enkasigu ĝin antaŭ la jarfino. Krome, la studento devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon, ĉu rete <https://esperanto-france.org/adherer> ĉu (lasante ĉekon) surloke pere de Said.
- reta kurso: la reta kurso mem estas senpaga. La francaj studentoj devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon <https://esperanto-france.org/adherer>

Zamfesto

Ĝi okazos sabaton 17/12 je la 2a ptm kaj kvarono, 19 rue Traversière, apud Gare de Lyon. Nia logobildo ne aperas sur la afiŝo (nur nia nomo) kaj ne klaras ĉu okazos spektaklero en Esperanto. Ĉu DL jam pagis nian parton kiel decidite lastan KK ? Ne ! Ni ne pagos ĉar ili petis nenion kaj mendis neniun esperantistan artiston. Kiu prizorgos la bufedon? DL kaj LPI. Se estas profito ĉu mone ĉu materiale ĝi estos por la sidejo. Ni disdonos kalendaretojn kaj aliĝilojn por varbi. Se estas permesite, LPI povos kunporti el la sidejo kelkajn ekzemplerojn de sia libro kaj de la bildstrio por vendi.

Reĝkuko

Ni fiksas la daton en januaro 2023 : **sabato la 7an je la 4a ptm**. Ni invitu novulojn. Ni prezentos verdan ĉapelon por ricevi donacojn. La buĝeto povus esti proksimume 100€. MG aĉetos la reĝkukojn, cidron kaj sukun. Dum la evento ni varbos por aliĝi al Espéranto France.

Membronombro

La aliĝo al Espéranto-France validas dum unu jaro de oktobro al septembro. Por la jaro 2022-2023, nia federacio hodiaŭ havas nur 73 membrojn (tiu nombro inkluzivas la dumvivajn membrojn). Tamen estas notinde ke la nombro kreskas laŭlonge de la jaro. Pasintjare 2021-2022, dum la ĝenerala asembleo (ĜA) en marto la nombro estis 88 kaj dum la KK de junio la nombro estis 115.

Nur la oficialaj membroj rajtas voĉdoni kaj partopreni la ĜA. Ĉar la ĜA okazas en marto, kaj do la voĉdonado okazas en februaro, gravas ke plej multe da homoj aliĝu frue anstataŭ prokrasti ĝis junio. Tial ni devas nun instigi al aliĝo. Ni tiucele varbos dum la eventoj (Zamfesto, reĝkuko). Ne hezitu instigi al aliĝo kiam vi informas pri eventoj en via informkanalo. Ni ankaŭ instigos al aliĝo en la tradiciaj novjaraj mesaĝoj. Ne hezitu proponi aliajn rimedojn.

Vizito de la Romanoj

Nia asocio invitas la Romanojn en Parizon, kadre de nia jarkunsido, dum semajnfino en marto: 18an kaj 19an de marto 2023. Necesas labori por prepari la viziton.

- provi ekscii pli malpli la nombron de vizitantoj
- detale organizi la programon de la vizito: turismo, biciklado, ludsesio, ktp...Niaj kutimaj monataj eventoj okazos dum tiu semajnfino, GVN bonvolu organizi la bicikladon
- organizi renkontiĝon kun la oficialuloj de Parizo, kun la ĝenerala asocio pri la ĝemelaj urboj Parizo-Romo se ĝi plu ekzistas, kontakti la DGRI : MG sendis mesaĝon al DGRI kaj ricevis neniun respondon. DL donas kontakton de respondeculo pri asocioj (ludovic.sage@paris.fr)
- organizi la loĝadon: nombri kiom da dormlokoj ni mem povus proponi, trovi alian loĝlokon nek tro malproksima nek tro multekosta. FLJ povus gastigi en sia onta luksa domo apud Parizo. DL povas gastigi paron en 75012.

Esperanto-ĉapeloj

Ni aĉetis 50 ĉapelojn. Ni pagis 200€ t.e. po 4€ ĉiu ĉapelo. Ni vendis ilin po 5€ ĉiu ĉapelo, sed ni vendis tre malmulte. Ni enspezis proksimume 30€. Ni donacis ilin al deĵorantoj en budoj aŭ similaj. Nun restas 7 en la sidejo.

Ĉu ni denove aĉetu la saman kvanton? Ni voĉdonas : 3 estas por, 1 kontraŭ, 5 sin detenas. La decido estas jesa. DJ mendos la ĉapelojn.

Agadoj kaj projektoj

Propono pri la datoj: ni havas tro da eventoj komence de la monato kaj maltro fine de la monato. Ĉu ni ŝanĝu? Jes, ni prokrastas la kulturalan vesperon kaj la ludosesion.

- Babilrondo Parizo-Romo ĉiumonate la 1-an sabaton
- Legoklubo kelkfoje jare
- Esperanto-kafejo ĉiumonate la 2an sabaton vespere (krom escepto)
- Espéranto café-croissant ĉiumonate sabate matene, konfirmenda de GVN
- Kultura vespero la 3-an merkredon kaj la 1an se eblas
- Ludoj ĉiumonate la 3-an dimanĉon aŭ la 4an
- KER-ekzamenoj: okazis sesio la 26an kaj 27an de novembro
- Prelegoj: denove estas nacia respondeculo (DL) pri turneoj. FLJ estas nia loka respondeculo. SAT-Amikaro proponas kunorganizi prelegon de Mikaelo Bronŝtejn en februaro.
- Vojaĝoj de Lucien Péraire: artikoloj en gazetoj interalie de Régis Fournier, la notoj estas ciferecigitaj, GVN preparas ekspozicion, konfirmenda de GVN
- Kontakti la mezlernejojn: konfirmenda de GVN
- Subglasoj: GVN ni kundividis la elspezon kun Esperanto 94 konfirmenda de GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP, ni aĉetis dekon da Metodo11 por disdoni, MP bezonas kunulon por viziti, ni ankoraŭ povos proponi enigi la retan adreson de ikurso en la ĝeneralan katalogon de la parizaj bibliotekoj
- Ministerio pri financaj aferoj: DL, LPI, PG. DL kontaktis la novan respondeculon pri kulturaj sekcioj, kiu favore respondis
- Unesco: UEA partoprenos eventon kaj rajtas sendi 5 reprezentantojn. Venos FLJ, Martine Demouy, Renée Triolle, Barbara Despiney, DL (vendredon).

Novulo juna nomita "Jean-Jacques" anoncis sian intencon organizi eventojn en Parizo kaj por tio krei WhatsApp grupon. AL havis tre etan kontakton kun li kaj provos rilati pli.

Respondeculoj pri agadoj (memorigo)

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ludoj: AL kun Marielle Martin
- Ekzamenoj : FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier
- Prelegoj : FLJ

Notu bone: post evento, la respondeculo sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org por publikigo en la sekva reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone: Michèle Abada-Simon pretas helpi kaj ĉeesti niajn eventojn. Necesas informi ŝin telefone al 09 54 02 85 12.

Informkanaloj

Tvitero/Mastodono

Ĉar multaj forlasas Tviteron, ĉu ni aldonu la kanalon Mastodono? Jes. Kiu pretas prizorgi? PG

DL: Jen opinio kiun mi hazarde ricevis hodiaŭ:

- *"Mastodon, c'est chouette*
- **Ref** : <https://grisebouille.net/mastodon-cest-chouette/>
- **Extrait** : "On cause beaucoup de Mastodon en ce moment. Je me suis dit que c'était le moment pour vous en parler, pas spécialement d'un point de vue technique, mais juste pour vous dire ce qui me plaît dans ce réseau." En gros, si vous voulez faire de la PUB, avoir 300 000 amis et vous mettre en avant... Mastodon ne sera jamais fait pour vous !"

Respondeculoj pri informkanaloj (memorigo)

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn

- Retejo DJ (AL)
- Facebook MG DL (nur pri café) MP
- Twitter.com/esperanto_paris PG
- Mastodono PG
- Dissendolisto Amikaro LPI (MG)
- Telegramo AL
- Amikumu LPI
- Eventa Servo MG AK DJ (MP)
- Meet-Up DJ

Venonta KK

La venonta KK okazos la 13an de januaro je la 7a ptm por prepari la ĜA-n kaj la viziton de la Romanoj.

FINO DE LA KK